

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby  
PLENUMITA 31/12/2020 Kvincentdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



Entute **769,300** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **289,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **220,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **216,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun studas **44,300** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro /marto 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 16 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).



### N.ro 16 de "Por Komencantoj".

Ni lernis ke ni povas rigardi la saman bildon aŭ uzi la samajn vortojn de okazaĵo el diversaj direktoj. Escepte de la Aktiva Voĉo, ni ne bezonas uzi la aliajn tri, ĉar oni povas uzi la Aktivan kun aldonaĵoj indikantaj la aliajn tri. Sed ni devas lerni ilin, ĉar ili aperas en la literaturo. Ili estas en



Esperanto, ĉar plej multaj eŭropaj lingvoj havas la kvar Voĉojn.

En la PASIVA VOĈO oni rigardas unue al la Objekto, kiu do venas unue en la frazo. Ĉar ĝi venas unue, ĝi nun estas la precipa frazparto kaj nomiĝas la Subjekto. Estante la Subjekto ĝi ne havas la akuzativan "-n"-finaĵon, do "La ŝtono". Due venas kompreneble la Verbo, sed por montri ke ni rigardas la okazaĵon malantaŭen, retroe, la verbo ricevas la sufikson "-at-", do "La ŝtono lavATAS." Post tiuj du partoj oni povas mencii la originan aganton, la originan subjekton, en la formo de Adjekto kun la prepozicio "de", kiel jene: "La ŝtono lavatas (farate) DE LA KNABINO". Fine venas la aliaj Adjektoj: "La ŝtono lavatas de la knabino sur la marbordo".

**Marcel Leereveld.**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



# Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



2020

# Feliĉan Novjaron

Novjaran rezolucion por vi!

„Subtenu AE per novaĵoj“



2021



## 350 milionoj da homoj strikas en Hindio

Novembro 26a 2020 Roger Springer




Ne estas sufiĉe grava novaĵo por la jenaj mondaj ĵurnaloj, televidoj aŭ multaj aliaj [The year that was...India's people fight back a hostile government : Peoples Dispatch](#)

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniuj informis AE**



Kara Roger, Jen Kristnaska kanto por vi kaj geamikoj.

*Wally du Temple*, Kanado <https://www.youtube.com/watch?v=JEchRohAV4>



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## M i a D i o .

(Antaŭ deko da jaroj mi laboris tro rapide, pro kio mi forgesis spiri, pro kio mi ekhavis anginon, pro kio mi havis koratakon, pro kio en la malsanejo oni metis aspirinon en mian sangon, pro kio ĉiu sango elfluis tra truetoj en miaj intestoj, pro kio mi bezonis tutan sangotransigon, kaj pro kio la kuracistoj decidis ke ili ne kapablas operacii min, kaj ke ili do lasas min morti. Dum la tagoj kiam mi atendis la morton, la Sinjoro igis min verki pri mia Dio, kvankam mi antaŭe pensis ke estas la Naturo.)

### Mia Dio.

Mia Dio estas tre potenca, ekstreme potenca, ĉiopova. Li povas fari kun ni kaj kun ĉio kion Li volas. Li estas la kreinto ne nur de la tuta mondo sed de la tuta universo. Fakte Li kreis min kaj la homaron, kaj Li estas la Mastro de ĉio. Nenio estas pli potenca, eĉ ne la Diablo, kiun, kompreneble, Li ankaŭ kreis. Kelkaj diras, ke li kreis viron kaj virinon laŭ Sia bildo, sed tion mi ne scias, ĉar mi neniam vidis Lian bildon, viran aŭ virinan, aŭ ambaŭ. Mi demandas min, kiu vidis Lin. Sed kelkaj pentristoj kaj skulptistoj pentris kaj skulptis Lin, en sia vira bildo. Kaj sia sana bildo, ne la bildo de membroperdinta militvundito.

Mia Dio estas ĉiopova, kaj kreis la homaron tia, ke ili povas fari bonajn agojn kaj malbonajn agojn. Kaj post tio Li observas. Li evidente ludas ludon kun ni. Li eĉ kreis militojn por ni, tiel ke ni povu mortigi kaj vundi unu la alian. Li estas la Kreinto de Granda Ludo.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Mia Dio estas granda kaj nekredeble potenca, sed Li aŭ Ŝi aŭ Ĝi ne estas afabla aŭ helpema Dio, ne laŭ homa perspektivo. Fakte, mi pensas ke nenies Dio estas helpema aŭ afabla, almenaŭ ne al la plejmulto de la homoj. Li estas tre kruela dio. Li povus esti kreinta la homaron pacema kaj ĉiam helpema. Sed tiukaze li ne povus esti ludinta sian ludon. Li estus povinta krei viron kaj virinon multe pli bona, sen eraroj. Mi ne estus kreinta senutilan apendikson, nek saketon danĝere pendantan inter la femuroj, sed mi estus metinta ĝin en la viran korpon. Kaj mi estas certa, ke medicinaj specialistoj, se ili ne precipe ĉasas la monon, estus povintaj fari multe pli bonan korpon, kaj multe pli bonan cerbon. Krome, Dio volanta, mi estus kreinta la viron kaj la virinon en tia maniero, ke registaroj kaj grandaj kompanioj ne povus menspolucii ilin. Sed tiukaze Li ne estus povinta ludi tiun interesan sed kruelan ludon. Do mia Dio estas potenca kaj kruela.

Mi preĝas al Li (aŭ Ŝi aŭ Ĝi) sed Li/Ŝi/Ĝi neniam donis al mi rektan kaj honestan respondon. Aliies Dioj eble faris. Kelkaj homoj diras, ke oni devas deĉifri liajn respondojn el la agoj kiujn Li faras al la homoj, sed tiam oni povas klarigi ilin tiel kiel oni volas. Mi ofte demandis al Li, kial Li punas senkulpajn malgrandajn infanojn per malsanoj kaj per misformadoj. Sed la nura respondo kiun mi povas deĉifri estas pli da suferado por senkulpaj malgrandaj infanoj. Eble Li faras tion por denunci min kaj ke mi devas ne preĝi al Li, kiel faras tiuj abomenaj nekredantoj. Tiukaze Li eble estus pli afabla al tiuj infanoj. Mi demandis al miaj diotimantaj geamikoj kial ili diras ke mi devas ne ekzameni la misterajn agojn de Dio. Ili pensas, ke Li havas misteran celon puni senkulpajn infanojn, sed mi pensas ke ĉar Li ekzistas Li ankaŭ informos min kial Li estas tiom kruela. Mi pensas ke mi povas fidi Lin kaj ke Li iam diros al mi, kial li faras la aferojn kiujn Li faras.

Mia Dio kreis grandegan nombron da suferoj. Li kreis ĉion, ankaŭ la suferojn, kiujn Li povus esti evitinta. La stultaj ateistoj diras, ke la homaro kreis Dion en sia menso, kaj en sia imago. Sed kiel la homaro povas krei Lin aŭ Ŝin? Tiukaze la mensoj de la homaro kreis la mondon, kun ĉiu sia suferado, dum niaj mensoj kreitaj de mia Dio funkcias tiom admireble. Kelkaj viroj diras (ne virinoj), ke ili estas profetoj kaj kreis sanktajn librojn dirantajn ke Dio ekzistas, kaj ke Li estas ĉiopova kaj respondeca pri ĉio kio ekzistas. Kaj mia propra kara sed kruela Dio kreis tiujn sanktajn profetojn kaj iliajn korpojn kaj librojn kaj mia Sinjoro ĉiam pravus ĉar Li estas ĉiopova. Tio logikas, ĉu ne? Laŭ ĉiu mia scio kaj, Dio volanta, mi scias multe pro la bona cerbo, kiun Dio donis al mi, mia Dio detruos kion li faris kaj kreos novan mondon, eble alian ludon por ludi. Aŭ eble detruos sin mem. Li povas fari tion ĉar Li estas ĉiopova. Mi esperas ke, Dio volanta, mi tiam estos vivanta en la Paradizo por vidi tion. Ĉar en la Ĉielo ni vivas eterne, eble pli longe ol mia Dio.

Ke mia Dio malkreos sin mem samopinias kun la doktrino ke Dio estas la Patro kaj ke normale la patro formortas por anstataŭati de siaj gefiloj kaj ke, post Lia jama morto, Liaj gefiloj jam transprenis Lian funkcion, en la formo de ĉiuj homoj.

Neniu rajtas diri al mi, ke mia Dio ne ekzistas, ĉar neniu povas rigardi en mian cerbon. Ne ke iu persono povas nei, ke mia Dio estas ĉiopova kaj kreis la mondon kaj homojn por ludi ludon de bona kontraŭ malbona, specon de ŝako. Ne ke oni povas nei, ke mia Dio estas tre kruela, eĉ malbonega laŭ homa vidpunkto. Tia estu ĝi, kaj Ĝi. Kaj mi ne povas nei, ke aliaj

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Dioj ekzistas por aliaj homoj, sed mi plu neas ke, ĉar mia Dio estas pli potenca ol ĉiuj aliaj, iliaj Dioj estus same potencaj. Tia estu ĝi, kaj Ĝi.

Sed mia Dio estas ankaŭ iomete necerta, ĉar mi ne scias ĉu Li estas en ĉi tiu mondo aŭ ekster ĝi aŭ ekster la universo. Kaj mi eĉ ne scias, ĉu Li kreis Sin mem, aŭ kiu aŭ kio kreis Lin. Mi penis trovi tion en la Sanktaj Libroj, sed nenie oni diras al mi, kio aŭ kiu kreis nian Dion. Kial ili ne diras tion al ni? Mi demandis al kelkaj kleruloj en pluraj religioj, sed ili donis al mi evitan respondon. Ili diras ke mi ne rajtas scii tion. Ha, ha, ha! Kial Dio dezirus kaŝi tion el de mi? Mi pensas ke Li estas honesta kaj ne scias Mem, kiu kreis Lin. Eble Li ŝanĝis el de unu potenca persono al alia. Sed kiu ŝanĝiĝis Lin?

En Sia senfina scienco mia Dio kreis mirigajn aferojn, kiaj la komplika kaj interesa homa korpo kaj tiuj komputilecaj cerboj. Kiu estus povinta fari pli bonan laboron? La plejparto de la kreaĵoj de Dio estas malbonaj, ĉar la plejparto de la homoj kaj aliaj animaloj kaj plantoj suferas doloron kaj timon, almenaŭ irante al siaj mortoj. Tio estas sendube por puni ilin pro ilia malbono, kion mia Dio donis al ili en granda kvanto.

Mi neniam vidis nek aŭdis nek sentis nek flaris Ŝin aŭ Lin, sed Ŝi aŭ Li ekzistas, ĉar kelkaj homoj skribis tion en Sanktaj Libroj. Kaj ili scias, ĉar Dio faris ilin honestaj kaj klarmensaj kaj imagpovaj. Kaj Li igis la ateistojn mensoguloj. Kaj ekzistas multaj mensoguloj.

Ĉiuj bilionoj da homoj havas iun Dion, sian propran Dion, kiuj ofte estas tre malsamaj. Sed ne pensu, ke ekzistas bilionoj da dioj, ĉar nur unu povas esti la Ĉiopova. Kaj tio estas la mia. Infanoj naskiĝas sen koni Dion, ĉar Li volas ke ili ekkonu Lin tra siaj gepatroj kaj gepastroj kaj profetoj. Mia Dio amas la infanojn, kvankam Li kelkfoje suferigas aŭ lasas ilin suferi terure. Sed ĉar Dio faras ĉion, Li faras ankaŭ la suferadon kaj la malbonulojn. Tio estas la ludo de mia Dio. La ludo mia estus ne igi infanojn suferi por la malbonoj de aliuloj, por la pekoj de aliuloj. Sed bedaŭrinde mi ne estas ĉiopova. Longe vivu Dio, kiu estas senfine perfekta kaj potenca! Nenio estas pli potenca ol Li. Tia estu ĝi, kaj Ĝi!

Tio estas mia Dio. Oh, mia Dio!

Marcel Leereveld.



Kredo: ne voli scii, kio estas la vero

Roger Springer



## Kristnaska saluto

Bonan vesperon,

Estas tro malfrue sendi Kristnaskan saluton al vi (kaj al la legantoj de via novaĵletero ...)

Sed, mi povas transsendi

*niajn sincerajn bondezirojn por la nova jaro!*

Espereble, en 2021, ni povos bonvenigi solvon por la nuntempa, mondiskala mizero.

Ĉiun jaron mi aldonas sentencon ĉe la bondeziroj kaj ĉijare mi elektis:

*Eble ne ĉiu tago estas bona,  
sed estas iom da bono en ĉiu tago.*

Korajn salutojn,

Amike, **Det Koing** (Nederlando)



P.S.: En la aldonita filmeto vi povas vidi la "laboradon" de Jan kaj mi ....



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**